

le monde de l'ESPÉRANTO

numéro
577

25 mars 2011



Amindaj



Daphne Lawless



Mikaelo Bronštejn



Asorti



Meven



Eterne Rima

DOSSIER

Musique en espéranto quel avenir ?

PAGE 6

ACTUALITÉS

Pétition pour l'espéranto au bac

PAGE 14

espéranto
France

3,80 €

- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

éditorial • frontartikolo

De la musique avant toute chose ! Dans ce numéro un panorama de la musique en espéranto. Il y en a pour tous les goûts : du rap à la musique folk, des mélodies douces au métallique, des chœurs classiques aux musiques déjantées... des musiciens venant de tous les continents... et aussi des idées pour pratiquer la musique en espéranto en France.



Par décision du Conseil d'administration d'Espéranto-France *Le Monde de l'Espéranto* est maintenant trimestriel. Autre changement : le bulletin internet mensuel *Esperanto Aktiv'* prend le relais d' *Okazas*, dont vous recevez le dernier numéro. Vous y retrouverez le calendrier et les actualités sur les groupes d'espéranto en France.

Nos amis japonais viennent de subir une grande catastrophe, et nous suivons les événements (presque) en direct grâce aux chroniques quotidiennes de HORI Jasuo, que beaucoup d'entre vous ont rencontré lors de ses tournées de conférences. Amis japonais, si loin, mais que nous sentons si proches de nous, courage ! Nous sommes de tout cœur avec vous.

À bientôt à Sète pour IREM 2011, la rencontre interassociative 2011 d'Espéranto sur la Méditerranée !

Claude Nourmont, rédacteur en chef

Antaŭ ĉio, muzikon ! En tiu ĉi numero, vi trovos panoramon de la esperantlingva muziko. Por ĉies gustoj, de rapo ĝis folkloro, de dolĉaj melodioj ĝis metalaj, de klasikaj korusoj ĝis deliraj muzikaĵoj... de ĉiuj kontinentoj... kaj kun ideoj por praktiki esperantan muzikon en Francio.

La komitato de UFE decidis ke *Le Monde de l'Espéranto* estu nun trimonata. Alia ŝanĝo : la monata reta bulteno *Esperanto Aktiv'* anstataŭos *Okazas*, kies lastan numeron vi nun ricevas. Vi retrovos tie la kalendaron kaj la novaĵojn pri la esperanto-grupoj en Francio.

Niajn japanajn geamikojn ĵus trafis granda katastrofo, kaj ni sekvas (preskaŭ) rekte la eventojn dank'al la ĉiutagaj raportoj de HORI Jasuo, kiujn multaj renkontis dum liaj prelegvojaĝoj. Japanaj amikoj, foraj kaj samtempe tiom proksimaj, kuraĝon ! Ni sentas nin kore kun vi.

Ĝis baldaŭ en Sète por la Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo 2011 !

Claude Nourmont, ĉefredaktoro

ACTUALITES

► De Zamenhof à Soros p.5

DOSSIER

► Espéranto et musique p.6

ASOCIA VIVO

► Internacia Festivalo p.11

BILINGUE

► Leciono por knabo p.17

VOYAGES

► Alice kaj Cédric, bicikla mondvojaĝo p.19

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Ceraisaie, F-75004 Paris

Tél. 09 51 77 18 33 - www.esperanto-france.org

Tout (sauf réd.) : info@esperanto-france.org

Bimestriel : 4 n° par an - Dépôt légal à parution

Tous droits de reproduction réservés

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : X. Dewidehem

Rédacteur en chef : Claude Nourmont

mondo@esperanto-france.org

Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro : F. Bartsch, N. Barros Rêgo, P. Berizzi, M. Bronstein, J.M. Cash, R. Coquisart, M.-H. Désert, W. Dumoulin, B. Flochon, N. Gaufilllet, M. Grosjean, A. Kadar, B. Lagrange, J. Lépeix, F. Lévêque, F. Lo Jacomo, G. Martin, F. Martorell, B. Moon, Y. Nicolas, C. Poullet, Retpaĝoj de Alice kaj Cédric, IREM, Kvinpetalo, Ret-Info, UEA. Merci à eux !

Publicité/annonces : à la rédaction

Abonnement : 1 an (4 n°) : 18€ à

Espéranto-France

Impression : IPPAC, Langres (52),

membre de Imprim'vert

Imprimé en mars 2011

Mise en page : Bruno Flochon

ISSN 1628-1942 - Commission paritaire : en cours



Entreprise-Espéranto fait saliver !

Depuis 2008, Philippe Bérizzi, gérant de la société Lingua-Force à Rennes, a développé un contact régulier avec quelques personnes, dont Olivier Clanchin, PDG de la société Triballat (Sojasun, Recreasun, etc.). Ils ont créé l'association Entreprise-Espéranto dont le but est de promouvoir l'espéranto dans le

monde de l'entreprise. P. Bérizzi a mis en place Ek°, un modèle de formation à l'espéranto sur deux semaines destiné aux entreprises et focalisé sur la conversation, la vie dans l'entreprise et les problématiques métier. Il était initialement prévu de l'appliquer au sein de l'entreprise Triballat à l'occasion de l'ouverture d'une filiale en Italie, mais celle-ci n'a pas (encore) eu lieu. Depuis, diverses actions ont été menées (stand sur un salon professionnel rennais, rencontre avec le directeur de l'association

Bretagne International, sponsoring de la rencontre de jeunes espérantophones MIREGE, création d'un prototype d'emballage Sojasun en espéranto...), et d'autres projets sont en préparation.



Prototypes d'emballages Sojasun en espéranto

L'espéranto au Forum Social Mondial

Plus de 100 000 personnes de 140 pays étaient présentes à Dakar pour le Forum Social Mondial. Exposants, conférenciers, sympathisants du Forum et bien sûr les Sénégalais et les étudiants de l'Université Cheikh Anta Diop qui hébergeait le Forum. Bref un essaim

bigarré. Echanges d'idées, échanges de produits, échanges d'informations. L'espéranto avait un stand, bien visible par une grande banderole et son drapeau juste à côté des restaurants ; ce lieu a attiré les foules et l'équipe présente, composée de Sénégalais espérantophones de longue date et de Mireille Grosjean de Suisse, a pu distribuer environ 14kg de matériel d'information en français, en anglais et en espagnol, donné par diverses organisations dont UFE. Ils ont pu participer à diverses émissions de radios locales et régionales et ont été interviewés par des lycéens de Valence (France).



Photo et info : Mireille Grosjean
<http://mirejo3.blogspot.com/2011/02/dakar.html>

en bref • mallonge


● KUMEUAUA TRADUIT EN 26 LANGUES

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, livre pour enfants sur la vie des Indiens au Brésil, vient de paraître en maltais. C'est la 26e langue dans laquelle a été traduit le livre de l'anthropologue Tibor Sekelj, originalement écrit en espéranto.

● UN LIVRE ÉTRANGE

Eble lunlumas : un conte en espéranto sous la forme d'un film minimaliste, dont il ne resterait que les quelques images indispensables au déroulement de l'histoire. C'est ainsi que le jeune Gapençais Julien Nicolas définit son livre, paru en novembre 2010.

www.juliennicolas.com/fr/livres/eble-lunlumas



↑ **NOUVEAU** : ce code est lisible par certains téléphones pour accéder directement au site évoqué dans l'article sans en taper l'adresse.

● AUTOROUTE VERTE...

Au Brésil, un grand panneau pour fêter le 15 décembre, jour de l'espéranto, sur le pont entre Rio de Janeiro et Niteroi.



De Zamenhof à Soros

«De Zamenhof à Soros», tel était le titre du symposium organisé en décembre 2010 par le bureau new-yorkais de l'UEA. Ce bureau, qui s'occupe principalement des relations entre l'UEA et le siège principal des Nations-Unies, organise tous les ans une manifestation publique à l'occasion de l'anniversaire de la naissance de L.L. Zamenhof le 15 décembre.

Il s'agissait de porter un regard historique sur la période de lancement de l'espéranto, organisé et appuyé par deux nouveaux livres : une biographie en anglais de Zamenhof -version résumée de la grande biographie écrite en espéranto par Aleksander Korĵhenkov il y a deux ans - et la nouvelle traduction d'un petit ouvrage de Tivadar Soros, qui est paru pour la première fois en 1923. Lors de sa conférence sur «Zamenhof et le futur» Esther Schor, professeur à l'université de Princeton, a examiné la conception du créateur de l'espéranto sur l'avenir de l'humanité et le rôle de l'espéranto dans ce contexte.

Le point final de la période 1887-1923 a été traité par Humphrey Tonkin, traducteur de l'ouvrage de Soros, «Modernaj Robinzonoj» (Les Robinsons Modernes), qui a été lancé lors du symposium. Cet ouvrage, appelé «Crusoes in Siberia» (Crusoé en Sibérie) dans sa version anglaise, relate l'expérience du jeune officier Tivadar Soros en Sibérie dans un camp militaire de prisonniers pendant la première guerre mondiale, puis son évasion. Le livre a été édité par Mondial, avec des notes et une préface du traducteur. H. Tonkin a également traduit le livre de Soros sur la seconde guerre mondiale «Maskerado» (Mascarade). Il avait même rencontré Tivadar Soros dans une réunion à l'auditorium de la bibliothèque des Nations-Unies en 1966 lors d'une



Foto Neil Blomstein/Isis/Madrid

conférence d'Ivo Lapenna. Il reconnaît à ce stade «ne pas encore avoir lu le livre» et il avoue qu'il ne pouvait prévoir que le fils de Tivadar deviendrait aussi célèbre. Sinon, comme il le dit avec humour, «la conversation aurait été toute autre».


Sam Green est déjà connu des espérantophones pour son film «Utopio en kvar movimentoj»

L'historien Ralph Dumain examina l'importante réaction médiatique à l'occasion de la visite de Zamenhof au congrès universel à Washington en 1910, et le cinéaste Sam Green montra une ébauche de son documentaire sur l'espéranto. Sam Green est déjà connu des espérantophones pour son film «Utopio en kvar movimentoj» (Utopie en quatre mouvements). Le nouveau film de 25 minutes est dédié exclusivement à l'espéranto ; c'est la synthèse des séquences filmées par Green au cours de quelques récents congrès mondiaux.

Mais ce qui a créé la plus grande surprise fut le discours (qui ne figurait

pas au programme du symposium) du célèbre financier Georges Soros qui, avec une partie de son état-major (et aussi son fils Jonathan) est venu pour la partie finale du symposium afin de célébrer le lancement de la traduction anglaise du livre de son père Tivadar. Soros, qui ne soutient pas l'espéranto en tant que tel, a tout de même passionnément souligné l'influence paternelle dans son éducation et a parlé pendant une dizaine de minutes de son père ainsi que du rôle joué par l'espéranto dans sa propre vie. Quand il est venu au Royaume-Uni en 1947, Soros a de suite contacté les espérantistes locaux, qui l'aiderent énormément. Il se rappelle également de rencontres entre écrivains espérantophones dans sa plus tendre enfance.

Georges Soros et son frère Paul ont contribué à la préface du nouveau livre de leur père. L'éditeur Ulrich Becker a présenté le livre à Soros et Tonkin a lu une partie d'un chapitre de «Maskerado» dans sa traduction anglaise.



(d'après Gazetara Komuniko de UEA n° 405, trad. N. Gauffillet)

Ni intervjuis Floreal Martorell, la motoro de Eŭrokka/Vinilkosmo, kiu liveris al ni ne nur aktualan panoramon pri la esperanta muzika produktado, sed ankaŭ pripensojn pri la estonto en la nuna retema (kaj ŝparema) mondo. Tamen en Francio, vivas kaj viglas la esperanta muziko. Regulaj prezentoj de Interkant', abunda muzika programo dum IREM kaj aliaj renkontiĝoj.



Mikaelo Bronŝtejn

KIEN LA ESPERANTA MUZIKO ?

Saluton, Flo !
Laŭ vi, kiuj estas la ĉefaj karakterizoj de la nuntempa muzika pejzaĝo en Esperantujo?

Floréal Martorell : Mi koncentros la respondon al tio, ke la ĉefaj karakterizoj de nuntempa muzika pejzaĝo en esperantujo estas diverseco de stiloj, diverseco de originoj (landoj kaj kulturoj), muzika kvalito ne neglektebla kaj restanta tamen en niĉo kadre de sendependa kaj alternativa muziksfero. Tial ekzemple Vinilkosmo estis bonvenigita en la federacio de la sendependaj eldonejoj.

La stiloj: ĉu vi povas precizigi ?
Nuntempe Esperanto havas larĝan palettron kun artistoj kiuj kantas en plej diversaj stiloj : kanzono (de popkan-

zono ĝis lirika kaj ĥorusa), folko kaj tradicia popolmuziko, mondmuziko, popo, pop-roko, roko, blusroko, punko, hardkoro, grinco kaj krusto, metalo (de peza rokometalo ĝis mortmetalo), elektronika muziko, plej diversaj stiloj de hiphopo (de gangstera repo trankrino, arenbio ĝis slamo), skao, regeo, aktuala afrika muziko, zuko, funko, rumbo, sudamerikaj kaj karibaj muzikoj (sambo, salso, tango) ; orienta muziko (kun arabaj kaj barataj influoj), ktp.



Efektive larĝa sortimento, kie certe ĉiuj povas trovi ion laŭ sia gusto, junaj kaj maljunaj, klasikaj kaj avangardaj. Kiu estis la evoluo de (preferataj) stiloj en la lastaj jaroj ? Ĉu la produkto de hiphopaj, regeaj, ktp. komplete superregas la pli tradiciajn stilojn ?

Jes, en la lastaj jaroj alvenis junuloj kun novaj stiloj pli aktualaj kun elektronikaj sonoj kaj ankaŭ hiphopo kaj efektive ankaŭ regeo aŭ skao, sed tamen daŭre roko, kanzono kaj folka muziko ankaŭ estas bone reprezentataj.

La originoj ? ĉu el ĉiuj kontinentoj ?
Ankaŭ originoj plej diversaj, multaj

el Eŭropo : sude Hispanio, Francio, Italio; de meza Eŭropo Svislando, Ĉeĥio, Hungario ; norde Nederlando, Germanio, Danio, Svedio, Finnlando; oriente Pollando, Rusio. En oriento: Taĝikio, Israelo, Siberio, Japanio, Koreio, Ĉinio. En Oceanio Novze-lando, Reunio. En Afriko Madagaskaro, Kongo, Niĝerio, Suda Afriko. En suda kaj centra Ameriko Brazilo, Argentino, Ĉilio, Kubo. En Norda Ameriko Kanado kaj Usono.

Jen abunda katalogo !

Nu, laŭ mi ne tiom, ĉar multaj el tiuj artistoj ne faris multajn eldonojn.

Jam en Francio estas tre diversaj kantistoj kaj bandoj. Ĉu vi povis precizigi pri ili ?

Ni ne povas vere diri ke estas multaj, sed tamen ekzistas kelkaj artistoj en Francio kiuj efektive povas koncerti en Esperanto-aranĝoj ĉu tutesperante ĉu mikse. La plej famaj estas JoMo (Jean-Marc Leclercq), Jacques Yvart, Ĵak le Puil, Kore, La Pafklik, sed ankaŭ aliaj kiuj aperas fojfoje : Duoble Unu, FaMo, Gijom... Estis ankaŭ la fama franca kantisto Môrice Benin , sed

En préparation, les prochains dossiers

LME 578 : Espéranto, langue de la
solidarité

Envoyez vos contributions à
mondo@esperanto-france.org

bedaŭrinde la Esperanto-movado ne vere akceptis lin kaj ne sciis ekspluati tiun okazon; li fakte faris tre malmultajn koncertojn en Esperanto kaj li estis kvazaŭ forgesita.

Siatempe en balkanaj landoj (ĉefe en Bulgario) pluraj kantistoj aktivis kaj registris diskojn (vinilajn, ja pratempo...). Ĉu daŭre estas esperantmuzika aktivado en tiu parto de la mondo?

Vi parolas pri artistoj konataj antaŭ 20 jaroj, kiel Veselin Damjanov, Mišo Zdravev aŭ ankaŭ Ĵana Cikalova... Bedaŭrinde nuntempe nenio plu ekzistas laŭ mia scio en Bulgario. Fakte en multaj eksksocialistaj landoj de orienta Eŭropo ŝajne la Esperantomovado iom malfortiĝis kaj ankaŭ la rimedoj; tio verŝajne ankaŭ agis kontraŭ la artista engaĝiĝo por Esperanto.

Se temas pri eksksocialismaj landoj, tamen almenaŭ estas aktivado en Rusio: M. Bronstein ekz., kaj la grupo Asorti en Litovio. Ili ankaŭ registras diskojn. Ĉu vi havis kontakton kun ili?

Jes, kompreneble, sed Rusio estas aparta ĉar ĝi ĉiam havis kaj konservis viglan bardan aktivadon; ne forgesu ke aperis la tuta kolekto «Oraj kantoj», kiu kompilas la aktualajn rusajn bardajn artistojn kiaj Mikaelo Bronŝtejn, Evelina Sokolova, Marija Koĉetkova, Oksana Zvereva, Oĉjo Dadaev, Andrej Obreskov, Mikaelo Povorin, Aleksandr Osokin, ktp.

Ankaŭ estas tuta anarkipunka hardkora kaj roka movado en Rusio kiu ekstaris por kontraŭstari la naziulojn kun junuloj sufiĉe aktivaj kiuj kreis eldonejon «Hej Hula!!»

Kun bandoj kiaj «Nigra kato», «kac-batalo», ktp... lige kun la alternativa movado tutmonda kiel ekzemple Voĉo Protesta, esperanta grinc-krustkora bando el Japanio, Pendumito en Pollando kaj Krio de Morto, Piĉismo en Litovio, kaj aliaj bandoj en Brazilo, ktp.

Pri Asorti, ni jam kunlaboras kun tiu popkantria bando. Ili aperis en nia elektronika kompilo per elektronika danc-



Asorti

titolo, nun ili preparas novan albumon. Ni ne forgesu ankaŭ en Ukrainio Michael Linecki kaj lian koruson, kiu eldonis albumon kun tradiciaj ukrainiaj kantoj, kaj ankaŭ la kantiston Paulo Moĵajev. Ankaŭ en Ĉeĥio estas la lirika kantistino Elena Puhova kaj en Hungario la popŝlagra kantistino Anjo Amika.

Mi neniam aŭdis pri esperanta muziko el Suda Afriko. Kiuj bandoj?

Temas pri junulo kiu ĵus starigis bandon. Espereble ni aŭdos pri tio en la venontaj monatoj, li promesis informi nin. Sed sen multaj rimedoj povas esti malfacile, same kiel pri la kongaj artistoj...

Tamen el Azio vere estas granda manko kaj en landoj kiel Ĉinio en kiu estas tiom da esperantistoj ne vere io elstara ekzistas. Junuloj kiuj provis starigi rokbandon en Ŝanhajo havis la plej grandajn malfacilaĵojn kaj devis rezigni. Li Fang faris albumon kaj poste malaperis.

Li Fang? Ĉu temas pri artistitino konata en Ĉinio ekster la esperanta konteksto?

Jes, ŝi eldonis kasedon en 1986 por UK en la sama jaro, sed post tiu kasedo mi neniam aŭdis pri io alia de tiu kantistino.

Ankaŭ Eruda (el Hongkongo) registris diskon. Ĉu vi aŭdis pri ŝi?

Mi ne aŭdis pri Eruda, mi ne scias pri ĉio...

Eble estas aliaj kaŝitaj muzikaj Esperanto-trezoroj en la mondo...

Kaj kio pri Japanio? Japanaj esperantistoj ofte emas prezenti ion en la internacia vespero dum la UK.

Pri Japanio kaj pri aktuala muziko mi povas paroli pri multfaceta artisto kiu de Tokio aktivis en pluraj projektoj por hiphopo (Eterne Rima), elektronika muziko (Lunatiko) kaj eĉ gotika metalo

(Kronlarvo).

Malfeliĉe La Mevo malaperis kun la forpaso de nia kara 45jaraĝa amiko Ono Takao el Jokohamo. Li tamen sukcesis du jarojn antaŭ la forpaso reldoni

kompilon de ĉiuj siaj kasedalbumoj kaj version de titolo aperinta en Vinilkosmo-Kompil Vol.1 en KD.

Do ne vere kontentiga situacio, same



Ono Takao



Eterne Rima

Daphne
Lawless

en aliaj landoj kiel Koreio kaj Tajvano, Vietnamio, ktp... ankaŭ Aŭstralio, en kiu estis eldonita albumo por UK sed sen sekvo.

Ĉu vi parolas pri tiu disko kun famaj aŭstraliaj popolkantoj? Valsu Matilda...

Jes, tiu bando kiu nomiĝas Ewe Euca-liptus. Tio estis projekto puŝita kaj portita de la esperantistoj el Adelajdo precipe, se mi bone memoras, laŭ instigoj de Margareth Furness kiu estis en la LKK de tiama UK. La bando registris tutan albumon en Esperanto el loka folk-muziko, kiu ofte sonas kvazaŭ kantrio... tamen la prononco estas sufiĉe misa kaj kun ege forta anglaŭstralia akĉento.

Tamen ankaŭ interesa estas la novze-landa bando Vostok Lake (Vostoklago) la bando de esperantistino Daphne Lawless www.vostoklake.org.

Bedaŭrinde ne estis multe da intereso kaj subteno flanke de esperantistoj kiam ŝi eldonis la albumon kun du esperantaj titoloj www.daphnelawless.com/oldmusic/eo/index.html

kaj necesus granda peto kaj instigo de

Esperanto
subgrundeRadio
SubgrundeMuzikvideoj
Vinilkosmo

Daphne Lawless



multaj esperantistoj por ke ŝi kuraĝu reverki kaj reldoni ion en Esperanto... Estas bedaŭrinde, ke kiam artistoj venas al Esperanto kaj produktas ion en Esperanto ili restas praktike ne agnoskataj de la Esperanto-movado.

Vi parolis pri alternativa muziko? Kion vi celas?

Alternativa estas tiu muziko kiu estas tre socikritika kaj eksternorma kaj kontraŭkomerca kiel povas esti alternativa roko, anarki-punko, hardkoro kaj kelkaj formoj de hiphopo.

Ekzemple nia Subgrunda kompilo estis tia. Nun ni ĵus disponigis ĝin senpage en la cd1d/Vinilkosmo-Radio kaj retejo ĉar la Kd elĉerpiĝis kaj estus tro komplike reldoni ĝin nuntempe. Jen la radio de Esperanto Subgrunde: http://cd1d.com/radio.php?release_group=149231 kaj la ligo al la paĝo: <http://cd1d.com/fr/album/esperanto-subgrunde>. Ankaŭ alternati-

vas la unua volumo de la hiphopa kompilo kiun eĉ Vinilkosmo ne povis eldoni pro ĝia eksternormeco (tial ĝi estis eldonita konfidence kaj libere disponigita) kun tiu baza principo de punka ideologio «Do it yourself» («Faru ghin mem»), kiu konsistas en tio ke por fari ion ne necesas peti aŭ pagi al kapitalistoj, laŭeble. Ankaŭ ĝi signifas «kontraŭ kopirajtoj» kaj «kontraŭ profit-celo». Multaj bandoj funkcias tiamaniere ĉefe en Rusio aŭ Brazilo (subgrunda alternativa movado).

Kiuj estas viaj plej lastatempaj produktoj?

La plej lastaj aperis en 2010 kun la Afrika Kompilo, kiu prezentas du albumetojn de pluraj kongaj artistoj el kinŝaso «Konga Espero» de Viktor Lufimpu, Denis Rock Tamba kaj Junior Ngangu el Kinŝaso, «Vigla Muziko» de Dido Fundu Mikatukidi kaj «Mayoma kun JoMo» de la aŭtoro kaj komponisto

Theophile Mayoma Diankembo, kiu helpe de JoMo povis eldoni siajn kantojn kiujn JoMo mem interpretas. Estis komplika projekto kaj rimedoj ne sufiĉis por plej elstare produkti la

kompilon, tamen ĝi estas unikaĵo kaj premiero ĉar estas la unua disko kun afrika muziko produktita en Afriko mem.

Krome Konga Espero produktis 3 muzikvideojn kiuj aĉetebblas elŝute en la Vinilkosmo-elŝutejo ĉe <http://www.vinilkosmo-mp3.com/videos-c-80.html?osCsid=06050c058ef2fe95b12a5f7499fc7111>

Tie eĉ eblas vidi fragmentojn de la 3 muzikvideoj.

Dum printempo aperis la albumo «samideano» de Eterne Rima, hiphopo krunka el Tokio, elstara albumo en tia muzikstilo.

Fine de la jaro en novembro kaj decembro aperis la albumoj «Trajn'

nenien» de Dolchamar (la 3a de la poproka finna bando) kaj «Urbano» la unua tutesperanta albumo de inicialoj dc el Frankfurto (elektropopo).

Kaj projektoj?

Nu nun ni prilaboras paralele du projektojn.

La albumo «Brassens plu» de Jacques Yvart, temas pri ampleksigita reldono de la unua KD kun kantoj de Georges Brassens, kiu elĉerpiĝis.

Tiu albumo aperos okaze de IREM en Sète por pasko 2011.

La HHK2 temas pri la dua volumo de la Hiphopa kompilo kun junaj artistoj el Kanado, Francio, Brazilo, Finnlando, Japanio, Germanio, Svedio, Danio... la eldono devus aperi dum la printempo Poste ni havas du distribuajn projektojn de albumoj memproduktitaj de la artistoj mem. Temas pri la unua albumo de Manüel (Emmanuele Rovere), itala kantisto kiun ni helpas por distribui la albumon kiun li produktis senprofitcele por helpi infanojn blindiĝintajn pro



malsano en Afriko.

La dua projekto estas tutesperanta albumo de la bando Revado (Rêverie), ankaŭ itala, kiu ludas profesie miksaĵon de muzikoj kiuj originas el la popol-tradicio, ĵazo kaj progresiva ĵazroko... la projekto estas preskaŭ preta sed mi ankoraŭ ne scias ĉu estos duobla albumo kun unu tute itala disko kaj alia tutesperanta.

Mi aŭdis pri kuba bando. Kio pri ĝi ?

Jes, bando de junuloj el Kubo « Amin-daj » furoris dum UK kaj IJK en Kubo pasintsomere, kaj entuziasmo kolektis monon por helpi Amin-daj-n registri albumon, kaj ili petis helpon de Vinilkosmo por eldoni la diskon.

Por mi estas tre nebula projekto ĉar mi tute ne povas imagi kia povos esti la rezulto... tio estas iom kiel kun la afrikaj artistoj pri kiuj ni povis nek helpi por

la prononco dum la registrado nek por havi superrigardon pri la registra kvalito.

Tamen ni decidis preterpasi ĉi tion ĉar estus bedaŭrinde maltrafi tiun okazon ke kubaj junaj artistoj povu prezenti sian kuban salsan muzikon al la esperanta mondo per disko. Tiaj iniciatoj devus veni el ĉiuj landoj, asocioj devus helpi artistojn por ke ili povu registri kaj eldoni siajn verkojn por pliriĉigi Esperanto-kulturon.

Ĉu aliaj projektoj ?

Tio esta tikla demando ĉar Vinilkosmo alfrontas gravan krizon, same kiel ĉiuj sendependaj diskeldonejoj. Mi ĵus fermis la kontojn de 2010 kaj la rezultoj estas katastrofaj : ni vendis praktike 50% malpli da diskoj ol pasintjare, kaj jam pasintjare ni vendis malpli ol antaŭajn jarojn en nia diskoservo www.vinilkosmo.com

La situacio estas drama por ĉiuj ĉar la disko estas iom post iom malaperanta. Antaŭ tio mi ne scias kion fari. Mi

jam lanĉis alarmajn alvokojn sed tio ne plibonigis la subtenon per aĉetoj de diskoj.

Kiam antaŭ 3 jaroj ni jam konstatis ekdisfalon de la vendoj ni decidis starigi la elŝutejon www.vinilkosmo-mp3.com/ por vidi ĉu per elŝutado de la albumoj kaj muzikojn tio kompensus la disfalon de la KD-oj. Sed post la kontoj de 2010 mi povas certigi ke tio ne kompensos. La elŝutkvanto de albumoj estas ridinde malgranda kaj necesus deklubi la rezultojn por kompensi.

Laŭ mi ni atingis sakstraton kaj mi ne



Kantistoj de Amin-daj dum koncerto okazinta la 27-an de julio 2010 kadre de la 66-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Villa Trópico, Santa Cruz del Norte, Kubo. Foto Julio César Tamayo Salas

bone vidas kiel eliri de tie.

Mi serĉas solvojn. Unu el ili estas antaŭvendi diskoprojekton. Sed se homoj ne plu emas aĉeti diskojn ni simple ne plu povos eldoni. Nek surdiske nek virtuale. Kaj do tio signifos ke ne plu eblos eldoni novajn albumojn kaj malkovrigi novajn artistojn.

Mi havas la amaran konstaton ke tamen junuloj havas kaj aŭskultas Esperanto-muzikojn, sed ili ne aĉetas ilin. Ili elŝutas ie en la reto kaj tio al ili sufiĉas. Ili ne plu emas aĉeti, kvazaŭ muziko ne meritis aĉeton.

Sed la problemo estas ke muzikproduktado kostegas kaj se oni volas elstaran kvaliton ne eblas sen financoj eldoni.

Ĉu muziko devas esti senpaga ? Se jes, kiu financu ĝin? Kiu subvencios ?

Kaj estas klare ke se Vinilkosmo ĉesigos eldonadon de Esperanto-

muziko la eldonejo malaperos iom post iom ĉar ne plu aperos muzikaj novaĵoj. Tio damaĝos la estonton de Esperanto-muzikkulturo. Tio ne signifas ke nenio alia aperos. Verŝajne artistoj mem elturniĝos, sed mi estas certa ke tio damaĝos la kvaliton artan kaj teknikan. Kaj se la KD entute malaperos nur restos interreto.

Ni klopodos rezisti, tial ni aliĝis al la federacio de sendependaj eldonejoj kaj malfermis tie paĝon en la elŝutejo de cd1d. Ni tie profitas pri pluraj iloj tre utilaj por disvastigi Esperanto-muzikon ekster la esperanta movado, ekzemple estas reta radio kiu konsistas el la muzikoj aŭdeblaj en la diversaj albumoj kiujn ni enretigis tie, kaj tion povas aŭskulti ĉiuj vizitantoj de la retejo, kio ja estas larĝa publiko.

Jen ĉi tie la ligo por malkovri la radion : <http://cd1d.com/radio.php?structure=82874>

Kaj jen ankaŭ la ligo por la spaco de Vinilkosmo ĉe la retejo cd1d:

<http://cd1d.com/fr/structure/vinilkosmo-esperanto-muzik-prod>

En ĉiuj paĝoj (ĉefpaĝo, artistaj paĝoj kaj albumpaĝoj) sub la angla kaj franca versioj aperas la esperanta versio por esperantistoj.

Ni esperegas ke 2011 estos pli bona jaro kaj por la diskoservo kaj por niaj du elŝutejoj.

Sed tio ne estas propra al nia muziko kaj al nia eldonejo. Multaj eldonejoj

sendependaj jam malaperis kaj multaj malaperos en la venontaj monatoj kaj jaroj. La ĉefa problemo estas ke ankaŭ kun ili malaperos la muzika diverseco. Kaj ke ni iros al pli kaj pli

stereotipa kaj unudirekta muziko, kiu estos en la manoj de la kelkaj grandaj multnaciaj (por ne diri usonaj) diskeldonejoj.

Ĉu vere ni volas tian estonton por muziko ?

Dankon, Flo, ni tamen esperu je estontaj kantantaj tempoj.



Vinilkosmo mp3



Radio Vinilkosmo



Vivanta Muziko en Francio, kreado, kantado, korusoj

Kanti ! Spekti vivantan muzikon ! Eĉ se la produkto de KDoj malmultiĝas, gravas ke la esperanto-muziko vivas kaj viglas en Francio (kaj ne nur tie).

Antaŭ du jaroj kreigis la koruso Interkant', kiu dank'al la entuziasmo kaj energio de Franjo Levêque, fariĝis nemalhavebla parto de nia muzika pejzagŝo.

Kiel vi povis legi en la antaŭa LME, la koruso sin prezentis en Havano, kun granda sukceso, kaj Franjo ricevis diplomon de UEA por Elstara Arta Agado. Plurfoje dum la jaro la koruso koncertis en diversaj lokoj, kaj la tieaj prezentoj altiras ankaŭ ne-esperantistan publikon. Ni gratulu al Interkant', ke ĝi fariĝis bonega ambasadoro de Esperanto.

Kiel Franjo laboras ?

« Mi retajpas esperante koruspartiturojn kaj ordigas ilin, kun aparta ligo nur atingebla de la korusanoj de Interkant' post enirkodo. Samtempe, mi registras ĉiujn voĉojn (soprano, aldo, tenoro, baso) kaj sammaniere ordigas ilin. Restas al la korusanoj elŝuti la tuton por hejme lerni.

Por prilabori «Ĝenerala Kanto»-n ofte mi vojaĝis al diversaj regionoj. Ĉiun trisemajnon averaĝe mi kantigis dum 2-3-4 tagoj.

Por la projekto Karmen', kun la estraro de Interkant' ni decidis ke mi malpli vojaĝu al regionoj sed proponos po 2-3 kanto-staĝojn jare dum 4-5 tagoj.

La korusanoj jam konas la venontajn kanto-staĝojn : 11-13 de novembro 2011 kaj meze de junio 2012. Ni intencas uzi niajn kulturajn centrojn. Tiele ni ŝparos monon kaj pli efika estos la laboro apud la korusanoj. »



Pri aliaj korusoj

Ĉu vi memoras pri Meven ? Eble, vi supozas ke ĝi malaperis ? Tute ne ! Ĝi estas aktivaĵo proponata de la bretona federacio. La celo de Meven kaj Interkant' estas uzi esperanton kiel

laborlingvon kaj prezenti esperantan programon.

En Arieĝo, la koncerto proponata estas rezulto de unu-semajna kanto-staĝo kaj ĝi okazas nur unu fojon jare.

Kaj ankoraŭ da muziko

En la kulturcentro Kvinpetalo okazas ĉiusemere muzika staĝo, kiu finiĝas per publika koncerto en la vilaĝo. Denove ĉi somere de la 16a ĝis la 24a de aŭgusto.

Kaj ankaŭ preskaŭ ĉiusemere FES-TooO ! Ĉi somere en Grésillon de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto.

Kaj jen kaj jen, okaze de renkontiĝoj, aŭ sendepende, okazas koncerto de Gijom, de Double Unu, de la Pafklik', de FaMo, de Jacques Yvart aux de JoMo... ankaŭ de

eksterlandaj artistoj.

Iujn el tiuj artistoj vi renkontis en la pasintjaraj kongresoj de UFE, aliajn vi renkontos en la baldaŭ okazonta intersocia renkontiĝo 2011 en Sète.

CNM

Dua projekto de INTERKANT' : serĉado pri novaj gekantistoj

Interkant' estas sendependa kultura esperanta asocio kreita antaŭ du jaroj. Ĝi jam sukcese koncertis ses fojojn pri « Ĝenerala Kanto », kaj du aliaj koncertoj estas preparataj; la lasta prezento, momente sengarantie, okazos en Sarajevo dum la kongreso de SAT.

Por ke tiu kultura engaĝigo pludaŭru, kompetenta skipo jam preparas la duan projekton.

“KARMEN' ciganino el Sevil”

Eniris la skipon por esperantigi Michel Duc Goninaz, Marcel Redoulez, Rikardo Cash, Bernard Legeay, Serge Sire. Konsilantoj : Laurent Peuch (teatraĵo), Bernard Behra kaj Jorgos. Enscenigisto : momente serĉata.

Por eliri kutiman rondon de la multnombraj interpretaĵoj, ni prilaboras kompletan spektaklon kun dancistoj (hispana asocio), rakontanto, aktoroj, gesolistoj, koruso (Interkant'), pianisto.

Daŭro de la spektaklo : 2 horoj

Celata publiko : ĉiuj publikoj.

La koncertoj, preferinde, okazos en regionaj festsalonoj de 200/300 sidlokoj. Cele al ekvilibro de impona buĝeto ni prezentos tiun spektaklon 3-4 fojojn en Francio.

La proponataj koruskantaĵoj, multe pli facilaj ol Ĝenerala Kanto, kanteblas de simplaj gekantistoj. Kiel por prepari la unuan koruspoemaron, eblas sole labori per retelŝuteblaj registraĵoj kaj partopreni en regiona trimestra provludo.

Eblas antaŭvidi, ke belgoj, germanoj,

svisoj, italoj kaj hispanoj partoprenu la projekton.

En 2012 kaj 2013 du staĝetoj de kvar tagoj estos proponataj, centre de Francio aŭ aliloke por faciligi al la eksterlandanoj, por kunigi la diversajn aktorojn de la spektaklo.

En esperanta gazetaro, vi trovos sekvontajn informojn laŭ la evoluo de la projekto.

Jam nun, sciui ke INTERKANT' serĉas gekantistojn, ĉefe tenorojn kaj infanojn. Se vi estas organizanto pri esperanta spektaklo pripensu programi nian spektaklon ekde la jaroj 2013/2014.

Franjo LEVEQUE (ĥorestrino)
leveque.franjo@gmail.com
3, rue Voltaire 22000 ST BRIEUC
Tel. +33 (0)9 53 92 77 37

Esperantistoj kunfestas

Internacia Festivalo

La 27-a Internacia Festivalo okazis de la 27-a de decembro 2010 ĝis la 3-a de januaro 2011 en la sama urbeto kiel la 26-a: Nördlingen en Bavario. Ĉi-foje la temo estis: lingvoj. Kelkaj pasintjaraj festivalanoj ne volis reveni al la sama loko. Eble tial estis ĉi-jare nur centoj da partoprenantoj. La organizanto Hans-Dieter Platz (HDP) esprimis sian maltrankvilon pri la estonteco.

Mi naive kredis, ke envagoniĝinte en Klermonto je la 6-a horo matene, mi atingos la stacidomon de Nördlingen je la 17-a horo 13. Sed la vintro kaŭzis ĥaŝon de ĉiuj transportoj. Finfine mi alvenis kun tri-hora malfruo. Multaj festivalanoj malfruis kaj mistrafis la interkonan vesperon animatan de Mikaelo Bronŝtejn. Por la malfruantoj restis en la kuirejo fromaĝo kaj porkaĵoj. Liba Gabalda donis al mi la festivalan tekono kaj la ŝlosilon de mia ĉambro.

En la mateno de la mardo 28-a de decembro mi vidis, ke mi disponas 14-eŭran krediton en la Knajpo, t.e. la trinkejo de la festivalo. Mi uzis ĝin ĉefe por trinki ginsengan teon. La Knajpo estis ĉefe babilejo.

La kompatinda Josi Ŝemer, ĵus spertinte 23 °C en Israelo, restis apud la radiatoro. Rusojn la vintro ne malkuraĝigis: ili invitis al « posi delki », tio estas rusa teo kun dolĉaĵoj. Tie Ljuba Malezh disdonis kalendarojn, kun bildoj de katoj, leporoj aŭ kunikloj, ĉar en orientaj landoj la 2011-a jaro estos dediĉita al tiuj bestoj.

Tiuj el la Rusoj, kiuj parolis esperanton, multe kontribuis al la programo. Tatjana Loskutova prelegis pri la diverseco de la lingvoj en Rusio. Bedaŭrinde multaj el ili estas malaperantaj pro la influo de la rusa lingvo. Anna Striganova kaj Dimitrij Sevĉenko prelegis pri « la lingvo de fabeloj ». Mikaelo Bronŝtejn prezentis siajn tri lingvojn: la jidan, la ukrainan kaj la rusan, kompreneble kun kantoj. Li ankaŭ prezentis siajn verkojn: aperis nova eldono de Dek tagoj de Kapitano Postnikov kaj nova romano lia, pri la 1990-aj jaroj en Rusio: Urbo Goblinsk.



La koruso de la barbuloj

Rusiano estas ankaŭ la Dagestanano Aĥman Junusov. Li ankaŭ prelegis pri diverseco de lingvoj en Dagestano.

Josi prezentis la hebrean lingvon kaj animis kvizon pri Esperanto. Susanna Baghdasaryan prelegis pri la armena lingvo. Estis ankaŭ multaj aliaj prelegoj: same kiel ĉe UK, necesis elekti inter samtempaj aranĝoj. Nur vespere estis nur unu programo. Kompreneble en la silvestra vespero ne mankis bankedo kaj balo. Alian vesperon gajigis Triksini per sia magio. Same kiel ĉe UK, la lasta vespero estis la internacia. Tie kantis du korusoj: la normala kaj la koruso de la barbuloj.

Kelkaj festivalanoj komentis bildojn pri siaj vojaĝoj: Amri Wandel pri Maroko kaj Tatjana Loskutova pri karavano, kiu veturis per trajnoj de Moskvo al la mongola limo cele al la kongreso de la aziaj esperantistoj en Ulanbatoro. Siaflanke al muzika vojaĝo invitis Wolfgang Loose montrante eltiraĵojn de operoj de diversaj eŭropaj landoj. Ĉi-foje la ekskurso kondukis nin al Munkeno, kie ni tagmanĝis en la fama Hofbräuhaus.

La 28-a Internacia Festivalo okazos de la 27-a de decembro 2011 ĝis la 3-a de januaro 2012 en urbo Xanten pri la temo: Benelukso

Ĵakelino Lépeix



Triksini

Kulturcentro de Esperanto

Bal masqué à Grésillon !

Fotofj François Lo Jacomo



Cela ne s'était pas produit depuis longtemps : le château de Grésillon a organisé un bal masqué pour le réveillon de la Saint Sylvestre. Et pas seulement un bal masqué : du 30 décembre au 2 janvier, certains ont progressé en espéranto, et diverses activités étaient proposées : Yoga, histoire de Grésillon, langue symbolique Bliss, présentation de EDE... En augmentant la puissance du compteur électrique, nous avons réussi

à chauffer la moitié du château, ce qui permettait d'accueillir 21 participants. L'âge n'étant pas limité, la fête a attiré des humains de 8 à 88 ans et des fantômes de 60 à 425 ans. Le réveillon très gourmand et allongé, dit Grési-veillon, a enchanté tous les palais, y compris ceux des végétariens. Retrouvez les photos dans le site gresillon.org <<http://gresillon.org>>, en haut de la rubrique Photos.

Bert et François



en bref ● mallonge

